Laŭzana Esperanto-Societo
Marto 2019 - no 3

# Laŭzana informilo

*Kunsidoj normale okazas ĉiumonateĉe Espace Dickens, rue Dickens 6, Laŭzano*

## *Venontaj kunsidoj:*

- Lu, la 1-an de aprilo *Ŝercadoj*
- Lu, la 6-an de majo *Decidota*
- Sa, la 22-an de junio *Ekskurso en Courtelary*
- Lu, la 2-an de septembro *Decidota*

## Lunde, la 4-an de marto, je la 20-a

## Stefano Keller parolos al ni pri sia respondeco kiel Ĉefdelegito de UEA ĉe UN

https://youtu.be/D4ObIJ3oGtk

**Unuiĝintaj Nacioj - Fanfaro por ĉiuj popoloj (2015)**

estas filmeto, kiu markas la 70-an datrevenon de la Unuiĝintaj Nacioj. Montrinte ĉe la 70-a Sesio de la Ĝenerala Asembleo de UN al spektantaro de prezidantoj, ĉefministroj, kaj ŝtatestroj el la tuta mondo, la filmeto enhavas la stimulajn vortojn de la Antaŭparolo de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj.

La filmeto, Fanfaro por ĉiuj popoloj, enkorpigas ses lingvojn kaj eksponas la laboron de la UN je la frontoj de paco kaj sekureco, homaj rajtoj kaj evoluigo. Uzante avangardan teknologion - inkluzive senpilotajn aviadilojn kaj aerajn fotojn - tiu ĉi filmeto montras neniam-antaŭ-viditan filmitaĵojn de la UN kaj ankaŭ dramajn vidaĵojn tra la mondo. Ĝi ankaŭ prezentas la voĉon dela aktoro Michael Douglas, la UN-a Mesaĝisto de Paco kaj ankaŭ spirhaltigajn kinematografaĵojn de internacie renoma franca kinisto, Yann Arthus-Bertrand.

Inspira kaj originala simfonia partituro, kreita de fama komponisto Rolando Gori, estis komisiata por tiu ĉi filmeto kaj prezentita de viva orkestro.

## Laŭzana Esperanto-Societo

pa. F. Randin
ch. de la Vallombreuse 14
CH - 1004 Lausanne
sekretario@eo-l.ch
+41 21 647 29 28
facebook.com/esperantolausanne
youtube.com/esperantolausanne
dailymotion.com/esperantolausanne
poŝtĉekkonto: CCP 10-26785-8

**Komitato 2019**

Prezidanto; Maryse Tissot (079 408 71 76)
Vicprezidanto: Knud Sunier (079 210 97 75)
Sekretario; François Randin (076 369 29 17)
Kasisto; Françoise Pétermann(079 517 44 43)
Redaktoro; Rosario Scopelliti (079 264 41 08)

## La komitato informas:

**La babiladaj rondoj je la 19-a**
La gastiganto informas pere de *Doodle*, kion la gastoj povas alporti.

*doodle.com/poll/8dk45bkb8brdf2nd*
**Okcidente:**
**la 1-an de marto** ĉe François Randin, Vallombreuse 14, Lausanne
021 647 29 28 / 076 369 29 17

*doodle.com/poll/rwvef6hykb5dqds6*
**Oriente:**
**la 29-an de marto** ĉe Charlotte Blanc Maillard, Nestlé 7, Vevey
021 922 34 74 / 079 393 32 63

**Ambaŭgrupe:**
**Vendrede, la 15-an de marto**
Francisko invitos nin ĉe Espace Dickens

**La tagmanĝo de LES** okazos jaŭde, la 21-an de februaro je la 12-a en Espace Dickens.

**Projekciado** de la MAGIA LANDO okazos jaŭde, la 21-an de februaro je la 17-a30 en la *Maison de Quartier du Désert* (finstacio de la buso 2)

**La kasta festo** okazos sabate, la 23-an de februaro je la 18-a 30 en Ĝenevo, rue de Montbrillant 20.

**La unua leciono** de la esperanta kurso okazos jaŭde, la 7-an de marto je la 17-a 30 en la *Maison de Quartier du Désert*.

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 1 | 2 | 3 | 4 | 5 |
| 6 | | | | |
| 7 | | ■ | 8 | |
| 9 | | | | |
| 10 | | ■ | 11 | |

*HORIZONTALAJ DIFINOJ*
*1. _ nia, kiu estas en la ĉielo; 6. Patro nia, kiu _ en la ĉielo; 7.Konsonantoj de roko; 8. Konsonantoj de osto; 9. Patro nia, kiu estas en la _ ; 10. Vokaloj de modo; 11. Simbolo por indio je kemio.*

*VERTIKALAJ DIFINOJ*
*1. Fiŝo; 2. Komputila kodo; 3. Konsonantoj de tuto; 4. Klaki, brueti; 5. Estas parto de skeleto (akuzativo).*

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| P | A | T | R | O |
| E | S | T | A | S |
| R | K | ■ | S | T |
| Ĉ | I | E | L | O |
| O | O | ■ | I | N |

# Karlo de Edmond Privat        dua ĉapitro: *La Hejmo*

Junaj gesinjoroj Davis estis nek riĉaj, nek malriĉaj, kaj havis treege ĉarman hejmon apud la urbeto. Tre simpla dometo, malgranda ĝardeno kun kelkaj arbetoj, jen ilia tuta hejmo, sed ĉio estis tre pura kaj delikata interne kaj ekstere. En la ĉambroj ĉio estis hela, la murpaperoj kaj la meblaro. Ĉie oni povis admiri, kiel orde kaj elegante la delikataj manoj de sinjorino Davis aranĝis ĉiujn aferojn.

La patro de Karlo Teodoro estis ĉefkomizo en filio de la nacia banko kaj li ricevis tre bonan salajron. Ĉar nek li, nek lia edzino multe elspezis, li povis ĉiujare ŝpari sumon por “siaj infanoj”.

Efektive, Karlo ne ĝuis tre longe la gloron esti sola en la nova generacio de la familio. Kiam li estis dujara kaj jam kuradis tre bone tra la tuta domo, li trovis iun tagon bluokulan fratineton en la antikva lulilo, kie li kutimis dormadi antaŭ tre longe... kiam li estis malgranda.

Aliaj kredeble estus iĝintaj tre ĵaluzaj, sed Karlo estis grandanima, kaj lia vizaĝo tuj montris larĝan rideton kaj afablan esprimon de protektemo. Petinte la permeson de sia patrino, li kisis dufoje la frunton de sia dormanta fratineto. Poste ekaŭdante la laŭtan ridegon de iu nekonata sinjoro kun pinta barbo kaj longa griza surtuto, li forte ofendiĝis kaj tuj eliris el la ĉambro.

Karlo tre multe interesiĝis pri la progresoj de sia fratineto Helenjo. Kiam ankaŭ ŝi povis kureti tra la domo, li fariĝis ŝia instruanto kaj gvidanto.

Karlo estis tre observema kaj ankaŭ tre entreprenema. Li penadis imiti ĉion interesan, kion li vidis aŭ pri kio li aŭdis. Uzante tablon kaj multajn seĝojn, li konstruis grandan ŝipon, kies bela flava kamentubo estis... la paperkorbo de lia patro. Por Helenjo li ĉiam aranĝis konfortan sidejon per broditaj kusenoj forprenitaj el la salono.

Kiam sinjorino Davis laboris ĉe sia kudromaŝino kaj Karlo ekfajfis kaj bruadis por anonci, ke danĝera ventego minacas la ŝipon, la timigita ekploris, tremante inter la broditaj kusenoj. Subite ĉio haltis : la kudromaŝino kaj la ŝipo. Helenjo baldaŭre trankviliĝis sur la genuoj de la patrino, konsolita, ĉu per ŝiaj dolĉaj kisoj, ĉu per la elokventaj klarigoj de Karlo, kiu venigis la ventegon nur por havi la okazon kuraĝe savi sian fratinon.

Supre en la domo estis longa subtegmenta ĉambro, en kiu kuŝis kestoj, korboj, seĝoj kaj malnovaj objektoj. Estis por Karlo vera paradizo. Kiam li trovis malfermita la pordon de la ŝtuparo, li rapide rampis al la ŝatata ĉambrego. Tie li plezurege ĉirkaŭpromenis, malfermante la kestojn, palpante kaj malordigante ĉiujn objektojn. La ĝojo daŭris, ĝis kiam lia patrino aŭ la servistino, aŭdinte bruon, venis lin preni kaj rekondukis lin malsupren for de la paradizo.

Por doni al si tute liberan kaj ne embarasitan ŝajnon li fiere frotis siajn terure nigrajn manojn sur sia beleta rozkolora antaŭtuko.

# Zamenhofa Festo 2018





Sabate, la 15-an de decembro, naskiĝdatreveno de Ludoviko Lazaro Zamenhof (1859 - 1917), LES kunsidis kiel kutimeen "Auberge Communale d'Epalinges" por festi la iniciaton de esperanto kundividante fonduon. La societo havis la honoron gastigi Nicole Piron, la vidvinon de Claude, "Johan Valano", la fama verkisto de *"Gerda Malaperis*".

Karlota, nia vicprezidantino, legis al la 18 membroj ĉeestantaj ĉarman poezion.